Estrara Komuniko 2014-51 sendita la 23an de decembro.

Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, redakcioj de gazetoj kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.

Karaj!

Al ĉiu ni kore bondeziras okaze de la solstica tago. Agrablajn festotagojn al ĉiu, egale ĉu religiajn, solsticajn, novjarajn aŭ nenovjarajn. Ni deziras novajn fortojn kaj entuziasmon al vi ĉiuj por la jaro 2015. Precipe al niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj ni alvokas por pli intensa dudirekta kunlaboro. Tra 2014 Universala Esperanto-Asocio provis teni vin regule ĝisdataj pri novaĵoj kaj projektoj. Tio atendeble plue okazos en la nova jaro, sed ni vokas por pli da helpo de niaj pli fortaj asocioj en la plenumado de nia internaciaj evoluigaj laboroj – por kiuj nesufiĉaj estas niaj propraj laborfortoj. Ni provos indiki al vi kelkajn konkretajn kampojn por tiu kunlaboro.

## AMO 7 Lomeo, Togolando

Ĵus finiĝis la Togolanda Esperanto-Kongreso; jen grupfoto el tiu aranĝo. La dua foto atestas la pretigajn laborojn por la AMO-seminario – pretas la nomŝildoj.






Inter la du aranĝoj estas unusemajna spaco, do eblas pretendi, ke ĉi tiu estas la unua solstara AMO-seminario ĝis nun. Ĝi ja havas komunan tagon kun la oka seminario. Jen jam la dua fojo, ke du seminarioj en du kontinentoj dividis saman tagon (la alia kazo estis inter Ĉinio kaj Italio).

## AMO 8 Weiβwasser, Germanio


Nia antaŭa sendaĵo donis la subtemojn de ĉi tiu seminario kadre de la Junulara Esperanto-Semajno (JES). Sed ĉe la pli fruaj sendkategorioj, mankis la nomoj de la gvidontoj. Do, ni ripetas tion, des pli, ke aldoniĝis nova gvidanto, kaj la vicordo estas nun difinita: atendeblas bunta oferto tra kvar matenoj, malferma al ĉiu JESulo.

- Grupformado, Projektmastrumado (Veronika Poór – lunde la 29an de decembro)
- Informado (Peter Balaž, marde)
- Financa Mastrumado (Nico Huurman, merkrede)
- Eblecoj de la nova reto 2.0 (Judit Meyer, merkrede)
- Eksteraj Rilatoj (Michael Boris Mandirola, sabate la 3an de januaro)

## Ses monatoj da komunikoj

Ni nun laboregas resumi la komunikojn de la jaro 2014. Por nun ĝi kovras nur la unuan jarduonon, kompletigo sekvos en la nova jaro. La komunikoj mem estas peteblaj de la verkanto, ĉu de unuopaj komunikoj, ĉu de ĉiuj, en ZIP-dosiero peza je 7 MB. Tial mi ne alkroĉas ĝin! Ni aspiras, ke la kolekto fariĝos atingebla tra retpaĝo.

| Dato | PDF? | Temoj | Notoj |
|---|---|---|---|
| 2014-01-22 | 2p | AMO 1, AMO 4, etape, Poznano, cirkulera listo el 2013 | 6 bildoj en PDF; 665 vortoj |
| 2014-02-07 | 3p | AMO 1 detala programo kaj temprezentoj | 2 bildoj en PDF: 1172 vortoj |
| 2014-03-07 | ne | AMO-1 sipendirezultoj, AMO-2, AMO-CN, AMO-IT. 353 vortoj | Alkroĉita: Programo AMO-CN |
| 2014-03 -20 | ne | Duona paĝo: AMO-1, ETAPO 14, Estrarkunsido de UEA | Teksto: 240 vortoj |
| 2014-03-22 | ne | AMO-1: du samtagaj komunikoj. Du fotoj nun aldonitaj. | Teksto: 665 vortoj |
| 2014-03-24 | ne | AMO-1 – la tria komuniko – pri la radio intervjuo kaj forumo | Sen alkroĉaĵo |
| 2014-03 27 | ne | ILEI en Urugvajo – raporto de Radojica Petrovic | Sendita el Roterdamo. |
| 2014-04-02 | 2p. | Estrarkunsido de UEA, neatendita AMO en IJK | PDF kun ses bildoj; 460 vortoj |
| 2014-04-14 | ne | Estrarkunsido de TEJO en Novara, Italio | Teksto: 645 vortoj. |
| 2014-04-26 | 2p. | UAM – Poznana kursaro. Pledo por kursanoj | PDF kun 2 fotoj, ligoj al filmetoj |
| 2014-05-10 | 2p | AMO-seminarioj 2, 3, 4 (CA, BR, CN). Gvidontoj, informoj. | Teksto: 363 vortoj. PDF kun 4 fotoj |
| 2014-06-01 | ne | UAM – Poznano – kondiĉoj por stipendioj. | Teksto: 550 vortoj |
| 2014-06-08 | ne | Stipendioj por AMO-IT. Sendita el Erfurt | Teksto: 330 vortoj |
| 2014-06-27 | ne | Vizito al Bulgario – kun libroj el HU. Bildoj postaldonitaj | Teksto 254 vortoj: (Beograd/Sofia) |
| 2014-06-29 | ne | Raporto pri Bulgario – sendita el Sofio. Bildo postaldonita. | Teksto: 370 vortoj |



Admirante tra la fenestro la subirantan sunon de la plej mallonga tago, refoje ni salutas; atendu nian sekvan, kaj eble lastan, komunikon de la jaro pri AMO 7 kaj AMO 8, sendota el Germanio.

Vortoj: 390 (sen la tabela teksto). LA cirk 2014-12-23 AMO 7-8 resum o.docx
PDF farita de Nuance Power PDF 1.0